

BIBLIOTEKO DE SENNACIULO

Serio, Literaturo


N^o 3

**RUĜO KAJ
BLANKO**

DE
L. JVN



**SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
ELDONA FAKO KOOPERATIVA / LEIPZIG**




SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Serio: Literaturo

L. JVN

Ruĝo kaj Blanko

Noveloj kaj rakontoj
originale en Esperanto
verkitaj



1926

ELDONA FAKO KOOPERATIVA | LEIPZIG

Enhavo:

Cimoj	3
I. Lod kaj Bert	3
II. La ponto	8
III. Ĉefo de fervoja gardistaro	19
IV. En C.K.K.	30
V. Finparoloj	34
Delegitaro	35
Nekrologo	48
Kim kaj Roza	58



82.3

821.922-3=922

CIMOJ

Cimo estas parazita insekto
kun malagrabra odoro.

Kabe, Vortaro de Esperanto.

I. LOD KAJ BERT

1. Regularo de ripozhejmo en Odessa

- § 1. Ripozhejmo celas restarigi sanstaton de laborulo.
- § 2. Tial ti-kiuj loĝas en ripozhejmo devas racie kaj laŭsisteme eluzi regulan nutraddon, ripozon, sanfortigon, sunon, aeron kaj sporton.
- § 3. Adaptinte al si la regulojn de ripozhejmo, ripozantoj penu transporti ilin en sian ĉiutagan hejmvivon.
- § 4. Tagordo en ripozhejmo:

7 h. matene	leviĝo
7,30	spirgimnastiko (15 m.)
8	tetrinko (unua)
9—11,30	maro, ludoj
11,30 matene	tetrinko (dua)
12,30—13,30	(farniento (malviva horo))
13,30—16	maro, aero, suno, ludoj
16	tagmanĝo
17—18	farniento ✓
18—20	ludoj
20	vespermanĝo
21—22,30	klubtempo
23	dormu!

§ 5. Kiu ne obeas la ĉef-regulojn, tiu foriras el ripozhejmo.

Jen ĉio.

2. *Malgraŭ tio (kio?) k-do Bert ne konsentas, sed li konsentos.*

Estis maro. En ĝiaj facilmovaj ondoj baraktis kapoj kaj manoj, kaptante, ĵetante kaj rekaptante flavan pilkon. Sekve estis *maro* kaj *ludoj*.

— Je kioma horo tio okazis? Maro kaj ludoj?
— ?!

(La demando estas por vi, kara leganto; do ne rigardu tiel apatie!)

Kvankam en tiu horo (?) laŭ la regularo (rig. supre) aero kaj suno devis manki, tamen ili ne mankis. Male, ili tiel aktivis, ke du k-doj, Bert kaj Lod, faris dank' al ili grandegan pekon. Bert kaj Lod ne obeis la regularon. Anstataŭ barakti en maro kaj ludi, ili enspiradis aktivecon de suno kaj aero, kuŝis sur la sablo kaj diskutis.

— Mi ne komprenas . . . (*Bert*)

— Sed vi konsentos . . . (*Lod*)

— Mi ne konsentas . . . (*Bert*)

— Sed vi komprenos. (*Lod*)

3. *Pri kio ili diskutas?*

— Certe pri homoj. (*Bert*)

— Certe pri cimoj. (*Lod*)

Demando: ĉu ĉiu homo estas homo?

— Ne. (*Lod*)

— Jes. (*Bert*)

Demando: kiu do estas homo?

— Homo estas homo. (*Bert*)

— Ne, proleto estas homo. (*Lod*)

— Kaj burĝo?

— Cimo!

— Sed burĝo povas fariĝi homo?

— Dubinde. Tamen esceptoj okazas. Nur tiu-
okaze plu li ne estos burĝo, sed proleto . . .

Pri kio ili diskutas?

Pri klaskonscio.

4. Kaj nun pri la regularo

Seruristo Bert estas politik-elmigrinto. Nun li ripozas, diskutas, ŝatas *sidi* sur varma et-grajna sablo. Hejmlande li ankaŭ ripozis (eĉ dum du jaroj): li sidis en karcero.

Kelkfoje oni lin torturis. Liaj fingroj havas rozpalan haŭton anstataŭ ungojn. De tempo al tempo dolora tremo movigas lian dekstran vangon. Tiam li grincigas la dentojn artefaritajn. La propraj restis hejmlande ĉe juĝ-esploristo. Malgraŭ tio li ne malgajas: la vivo estas ankoraŭ antaŭe; ni ree batalu, diablo prenu!

Tial post du semajnoj li revenos la karan "patrion".

— Tamen el Sovetio mi revenos pli armita ol ti-
kiam mi trafis en ŝtonan kaptilon. Ja neĝbulo rulata fariĝas finfine neĝamaso.

— Kial vi rapidas? Kolektu la neĝon. Venos tempo, kiam la venko dependos de via malvarma sango kaj frostiga malamo. Kaj plejĉefe forgesu pri kompatoj al cimoj. Brogu ilin per bolakvo, se tio necesas. Pli bone estas neniigi dek burĝojn (erare) ol nun preterlasi (ankaŭ erare). Neniam oni estas pli malfortaj ol en la horo de venko.

— La regularo estas tre severa.

— Ĝi necesas.

(Paŭzo.)

Lod ekfumis cigaredon "Salve" ("Estu sana!") kaj, englutante malsanigan tabakan maldolĉon, daŭrigis: — Jen vidu: la regularo. Jes, la severa, ĝenplena, kvankam malgranda. Tamen ĝi necesas. Mi havas plialtiĝon de korpopezo je 8 kg. dum lastaj du semajnoj. Mi estas freŝa kaj preta por ĝojplena laboro. Sed mi mem protestis kontraŭ ĝi. Akre protestis. Ne volis obei. Tamen kiam mi konsentis kun ĝi, tuj mi komprenis ĝian neceson. Kaj tio min ĝojigas.

— Jes — respondis iom malgaje Bert: vi povas plenĝoji. Vi laboras por vi mem, sed ni...

— Kia eraro! ekkriis Lod. Ĉu "ni" ne estas samtempe "vi"? Certe estas. Ĉu ni havas patrion? Ni laboras ankaŭ por vi, por ekstermo de burĝa sociordo. Tion celas ĉio en Sovetio, eĉ la regularo de ripozhejmo.

5. Pri paradoksa cikatro

La diskuto ĉesis. Ambaŭ kamaradoj ekkuris al maro, saltis ĝin kaj sekvis la regularon, t. e. partoprenis "akvo-pilkon".

Kiam aero kaj suno estis permesitaj por uzado, Lod kaj Bert daŭrigis sian matenan babiladon.

Super mar-nivelo flugis ekscititaj sanplenaj ek-krioj de gekamaradoj, kiuj instruis unu la alian naĝi kaj subakviĝi; flugis ankaŭ amplenaj konfesoj de lun-amantoj, kvankam luno ankoraŭ ilin ne benis per siaj citronkoloraj radioj.

Sed tion nek Bert, nek Lod aŭskultis.

Kial?

Ĉar okazis jeno.

Bert (ŝerce): Vi tre ŝatas esprimon "necesas".

Lod (serioze): Jes.

Tiam *Bert* (gaje): Eble ĉio en la mondo "necesas"? Ekzemple: via cikatro sur la kranio. Ĝi ankaŭ eble por vi "necesas"?

Lod tuŝis la cikatron, sulkigis la frunton, elblovis kelkajn fumringojn kaj rememoris evidente ion malgajan, ĉar lia voĉo ekstremis, kiam li diris:

— Jes. Siatempe ĝi estis ankaŭ necesa. Dank' al ĝi mi estis mortanta, sed mi nun estas vivanta ankaŭ dank' al ĝi.

— Vi ŝatas, kiel cirkisto, ĵongli. Almenaŭ per vortoj.

— Tute ne. Mi ne paradoksas, ne ŝercas. Se vi volas, mi rakontos pri tio.

Kaj Lod komencis rakonti.

II. LA PONTO

1. Damludo

Antaŭ 8 jaroj laŭ decido de l'partio mi laboris en Donec-regiono. Mi estis telegrafisto de malgranda fervoja stacio. Mia helpanto estis ankaŭ partiano — Kras, eks-studento de ĉefurba Politeknika Instituto. Nia laborloko — stacio Lo — estas dekstra bazpunkto de l' triangulo fervoja, kies plej-supro estas Juzovo. Pli dekstre de Lo situas karbo-riĉa Makej.

Ĉe apudaj stacioj loĝis ankaŭ partianoj kaj en Juzovo sin kaŝis Regionkomitato. Nia komunik-linio estis seninterrompa kaj ni konstante ricevadis pakajojn da libroj kaj propagandiloj por ministoj, kiuj ŝajnis veraj eksplodigiloj. Estis necese nur kunligi ilin kun eksplodobjekto. Tiam soci-tremo estos tiom forta, ke la imperialisma milito nepre ĉesos, tronoj skuigoŝ kaj laboristaro akiros plen-potencon. Tiaj estis niaj planoj kaj ĉef-lokon en ili okupis Donec-regiona minista striko, ĉar tiu regiono estis la plej grava punkto en milit-organismo.

Por tiu striko estis bezonata signalo kaj ĝin ni atendis ĉiutage. La malpaciencon pligrandigis enua vivo en Lo. Ne ĉiam ni povis iri al laboristoj. Oni senĉese spionis ĉirkaŭ la minejoj. Sola distraĵo estis damludo. En ĝi precipe sukcesis nia stacia ĝendarmo, ruza kanajlaĉo. Li ŝajnis fari nenion krom ludi.

Kras dank' al tiu ludo nerv-malsanis, ŝvitis, kapdoloris elcerbigante movojn:

— Se li, se li iros tien, do mi — alien; se li . . .
Sed *se-li-gata* ĉiam estis li, ne la ĝendarmo.

Mi ne ludis kaj preferis esplori la ĉirkaŭaĵon aŭ renkonti vagonarojn.

2. Signal-letero

Jus estis alveturinta la alnorda vagonaro. Mi malrapide promenis apud ĝi. En ties finparto malfermiĝis la pordeto kaj al mi saltis alta homo, mallaŭte dirinte:

— Estu preta, Lod.

— Ĉiam.

(Tiumonate ni akceptis ĉi-kaŝparolon skoltan)

Kaj la homo rapidmove transdonis koverton:

— Regionkomitato ĝin sendas. Rivelu la tekston laŭ n-o 3.

Kaj li foriĝis.

La vagonaro ekgrincis. Mi min turnis al la stacionkoro kaj ekrimarkis la ĝendarmon. Rekta, kiel telegrafa fosto, li senmovis apud la kupra sonorilo. Streĉokule li min observis.

— Ĉu konatulon? Okazas, okazas. Kaj eĉ letereton?

Mi ekmiris:

— Konatulon? Kiam?

— Ĉu ne? Ĉu tiu altulo nur demandis: kie fluas bolakvo por pasaĝeroj?

— Ne! Li demandis: kie loĝas la fama lud-fripono. Kaj mi montris la loĝlokon de l' kanajlo.

— Ci min...

(Mi estis jam foriranta kaj ŝajnis ne aŭdi liajn insultojn.)

Hejme mi prenis kemian recepton n-o 3, rivelis la leteron kaj tralegis:

“Hodiaŭ je 20 h. 30 m. kamarado Lod estos apud ponto n-o 1, kie sur ŝoseo li renkontos 2 k-dojn en ĉaro. Kaŝparolo la sama.

Kamarado Kras post foriro de l'milita vagonaro je 21 h. difektos telefon-telegrafajn dratojn en direkto al Makej. Ankaŭ li malhelpos komunikadon diversmanieran kun aliaj stacioj dum unu horo, ne malpli. Kamarado Lod revenos la stacion Lo, se ne estos ricevitaĵ de li novaj instrukcioj apud la ponto n-o 1.

Sekretario de P. K-to Donecregiona *Nordano*.”

Mi venis la kontoron, kie frapetis per Morze Kras kaj transdonis la leteron.

— Sed tio ŝajnas esti nur por vi?

— Legu pluen!

Kaj li paliĝis.

La letero estis jam forbruligita, kiam brue malfermiĝis la pordo.

— Kial do fumo ĉi-tie? Ĉu vi volas... — la ĝendarmo rapide sin klinis al la planko, kaptis nigran restaĵon de l'papereto kaj ekgrumblis: Por kia diablo staras ĉi-tie la paperkorbo? Ho, kiaj neakuratuloj vi estas, kvazaŭ porkoj.

Mi ekridis:

— Ĉu serĉu vi, ĉu ne serĉu, kato sendenta, tutegale vi trovos nenion! La birdeto jam estas fo—or!

— Sekve ĝi estis ĉi-tie?

Kaj li formarŝis.

3. *Kras plendas kaj sin pledas*

— Kion vi faris? — ekflustris nerve *Kras*: — Ĉu vi ne komprenas, ke nun mi estas pereonta. Post la “afero” vi nepre ricevos “novajn instrukciojn” kaj forkuros sendanĝeran lokon. Kaj mi restos sola. Certe oni min kaptos laŭ denunco de ĉi vulpo (li vidis nin kune, li rimarkis la kaŝletereton; li ĝin eble restarigos) kaj min oni pendigos, akuzinte pri drat-difekto, ĉar por tio ne ekzistas malpli severa puno.

Mi preskaŭ ne aŭskultis liajn parolojn. Alio min okupis tiutempe. Eble la fripono ion suspektas aŭ havas fadenfinojn de l’ afero en siaj manoj? Kia maniere tion mi eksciis? Eble li preparas kaptilon por ni, aŭ damludas kun ni laŭ sia kata sistemo.

Min rekonscigis la vizaĝ-esprimo de *Kras*, kies paroloj, ree trakuris mian cerbon. Li ne plenumos, ŝajne! Kaj mi ekkriis:

— Ĉesu ĝemi, ne infanaĉu. Kion ajn ni faras, ni faras plenkonscie, sciante kio nin atendas. Eble post la afero vi estos arestita, sed kiu pruvos, ke vi ĝin partoprenis? Min oni povas ankaŭ aresti, ĉar mi devas tutegale resti en Donecregiono por gvidi la strikon, kiu nepre eksplodos, ĉar la reakcia

premo pligrandiĝos post nia afero. Ĝendarmaj ĉas-hundoj esploros la tutan regionon: multaj kamaradoj estos arestitaj; laborist-indigno, kiu nun bolas interne, eliros eksteren. Okazos milit-ribeło. Civila milito. Socia revolucio. Ruĝa ŝtormo skuos la mondon kapitalistan, kaj tiel plu... Nia tasko estas tre grava: ni donas la signalon. Ties malsukceso povas por longa tempo prokrasti la tutlandan revolucion eksplodon. Do ni estu singardaj.

Tiel parolis mi, sentante, ke Kras fariĝas pli kaj pli fremda por mi ĉiuminute. Lia kapo falis sur la inkmakulitan tablon kaj li plorgemis, kiel hundido.

— Por vi bone estas. Vi nur ŝmiras min. Vi ne revenos, ĉar Nordano vin amas kaj ne sendos por aresto. Vi estas grava figuro. Kaj mi... mi estas nur griza revolucia ŝaksoldato, kies pereon eĉ neniu rimarkos. Via pensmaniero estas tiu de l' carisma generalo, kiu el sia oportuna, sendanĝera kabineto direktas al morto milionojn da unuoj. Ili fariĝas sterko. Kaj poste la generaloj plej trankvile rikoltos per fremdaj manoj. Vi ankaŭ generalas. Vi ne atentis, ke mi deziras ne malpli forte ol vi ĝisatendi la novan soci-ordon. Sed kial do *mi* devas morti, kaj niaj ĉefoj (kiuj nenion faras eksterlande kaj sendanĝeras) estas ĝuontaj la vivon estontan? Mi donis sufiĉe da sango al la partio: forigo el Instituto, 3 jaroj en malliberejo, hundaĉa vivo. Kion... kion vi volas ankoraŭ? Ĉu iam oni diris al mi afablan, kamaradecan vorton? Nur insultoj pri mia inteligentula deveno. Malkonfido.

Senkontraŭdiraj dekretoj: “K-do Kras estu tia! K-do Kras estu alia! K-do Kras iru tien, iru alien.” Ĉu oni demandis iam mian opinion, mian konsilon? Kiu atentis nulon? Tamen *nulo* havas sian apartan vivon kaj volas kelkiam ekzisti nur en si mem kaj nur por si mem.

Verŝajne lia monologo daŭras kelkajn horojn, se mi ĝin ne ĉesigus.

— Sekve vi rifuzas? Bone, sinjoro Kras.

Kaj mi direktis min al la pordo. Sed li kaptis mian bluzon, konvulsiis, hurlis:

— Ĉiam la samo. Mi malfermis animon mian al vi, konsilon kamaradan petis mi, helpon kaj vi... generalas nur.

Mi ektimis, ke iu kaŝ-aŭskultos ĉi-historion kaj forte eltiris la bluz-ekstremon el liaj malvarmaj fingroj. Mi forkuris hejmen. Tie mi preparis ĉion por serĉ-esploro, ŝargis mian braŭningon, metis ĝin en la poŝon, prenis fiŝkaptilon kaj ekpaŝis al la rivero.

4. *La ponto ja estas gardata*

Estis jam la dekoka horo. Mi min kaŝis en prunela arbustaro sur monteto riverborda. De ĝia supro trans densajn branĉojn mi povis sendanĝere observi la stacion, vilaĝon kaj forirantajn al horizonto relojn. Mi sidis senmove, tiom trankvile, ke vigla skolopo sidiĝis kviete apud mi sur la sablo kaj ekserĉis insektojn. La kanoj, sin klinante unu al la alia ŝajnis telegrafi ion sensacian. Dekstre sin

levis blankaj feraj traboj de l' ponto n-o 1, kiu ŝajnis pendi en aero. Apud la ponto nigris figureto, ne pli granda ol formiko.

Kaj mi rememoris: la ponto ja estas gardata. Tie ĉiam deĵoras soldato kaj du aliaj sidas en kabano ĉe apuda legomĝardeno.

Ĉu kamaradoj ne forgesis ĉi-fakton? Se mi mem forgesis, do ili... Kaj mi eksentis la ŝultron konvulsii. La fiŝkaptilo falis kaj brue batis la akvon. La skolopo timigite svingis la flugiletojn kaj forflugis trans la riveron. Tremante, per la mano maldekstra mi elpoŝigis la horloĝon. La 20-a horo. Mi ĉirkaŭrigardis. Iris neniu. Nur ĉe l' horizonto abrikot-kolora sur la ŝoseo aperis malgranda polva nubeto kaj foriĝis tuj. La suno subiris kaj violaj ombroj avide lekis ankoraŭ varman teron. Mi mal-supreniĝis al vojeto, kiu rampis inter kanaro kaj prunela arbustaro. Veninte al la ŝoseo mi ree min kaŝis en densejo.

La ponto blankis tra mallumo. Alte, alte en ĉielo kriis sovaĝaj anasoj kaj anseroj. Odoris marĉo, kie kvakis senĝenaj raĵoj.

5. *Kion faros Kras?*

Guste je dudek kvin minutoj post la dudeka horo ekbruis la radoj kaj sur vojkurbiĝo haltis simpla kamparana ĉaro kun du vilaĝanoj. Ambaŭ ili saltis al la tero. Unu komencis ordigi la jungilaron kaj la alia urinis malrapide. La lasta estis ti-kiu trans-

donis al mi la leteron. Sed la maljunulo? Mi streĉis la okulojn kaj subite rekonis:

— Nordano, bonan vesperon!

— Ne skrapu la gorgon, Lod. Ĉio estas en ordo?

Mi tuj montris la nigran formikon, kiu marŝis kun fuzilo ĉe la ponto:

— Necesas lin forblovi! Ĉu vi pripensis, ke krom lia fuzilo ankoraŭ du estas en la kabano?

— Ne faru tumulton, ne babilaĉu. Mankas tempo. Raportu pri Kras. Eble li disenterias? Malplaĉas al mi ĉi nazumulo. Ne kredas mi al vitrokulaj strigoj. Kaj la apudponta soldato, li estas nia kamarado. Li ebriigis du aliajn kaj nun ili dormas kunligitaj en legomĝardeno. Jen ĉio. Nun vi rakontu.

Rapide mi komunikis pri Kras-perfido. Nordano kraĉis, grimacis, insultis. Fine li vort-ĵetis:

— Simpatias ili laboristaron, kiel kato muson.

Parol-onanistoj. Bone. Vi ankaŭ estas tro saĝa. Kial do antaŭe vi ne komunikis, ke Kras jam plene forputris. Por tiu grava loko ni sendus alian.

— Sed ĉu li denuncos, kiel vi opinias? — nedecideme demandis mi.

— La demando malfruis. Necesas labori. Kras ne malhelpos. Tiuj kadavraĉoj nek volon havas, nek kuraĝon. Li ne perfidos, se oni lin ne tuŝos. Tamen se oni eĉ iom pikos lian fingron, li tuj ĉion elversos. Nu, pri tio sufiĉas. Lod, prenu bikfordan ŝnuron; Ĵak! vi restu ĉe l'ĉaro... Kvazaŭ riparu ĝin. Se okazos danĝero — fajfu dufoje. Ĝis la...

Kaj ni disiĝis.

6. *Estu preta! ĉiam*

Apud la ponto la gardanto ekkriis:

— For! Malpermesite estas alproksimiĝi vespere al la ponto. Post tri sekundoj mi pafos. Unu, du...

— Estu preta!

— Ĉiam! — gaje li respondis.

' Kaj ni ĝisvenis la pont-eniron. La soldato raportis:

— Ĉio estas en ordo. Ambaŭ kunuloj ronkas en brasiko. La vino estis ne tro forta, tamen. Mi mem iom...

— Sufiĉas! — interrompis Nordano: Rapidu! Jen la ŝnuro, jen eksplodigiloj. Kunligu. Ne prokrastu. Lod, helpu. Ĉi-tien.

Ni alkroĉis la ŝnuron, metis piroksilinajn kartoĉojn sur la traboj kaj, tirante la ŝnuron, malsupreniĝis en prunelarbustojn, kies branĉoj ŝiris mian vestaĵon kaj dolorpikis la korpon.

7. *Stranga bruo*

Malproksime ekfajfis lokomotivo. Sekve la vagonaro jam estas foriranta. Baldaŭ ĝi estos sur la ponto. La granda milita ŝarĝvagonaro kun kanonoj, eksplodaĵoj, grenadoj.

La soldato subite ekspiris:

— Ĉu vi scias, kamaradoj: ni ĉiuj pereos! Ni ne sukcesos forkuri en sendanĝeron lokon, se estas veturigata dinamito.

— Ne tumultu vane, — trankviligis Nordano:

— la ponto eksplodos; la vagonaro trafos en riveron, kiam la pont-eksplodo estos jam finita. Tio ne gravas, sed... kio susuras tie? Ial strange!

— Kanaro eble.

Li nee balancis la kapon, rigardante en la mal-lumon.

Mi rememoris pri nia ĝendarmo, sed tuj forĵetis la timon. Li ja scias, ke la ponton gardas tri soldatoj — do li nenion povas suspekti.

La lokomotivo jam ronkis pli klare. En nokta silento obtuze bruis la radaro. En ĉiela nigra fono orfajris giganta balailo de Juzovaj gisuzinoj.¹⁾ Nordano staris rekte, streĉite. Li fermis la okulojn kaj sin klinis al la tero:

— Strange, — diris li: — mi havas blindulan aŭdsenton kaj mi precize distingas homvoĉojn. Jes: homvoĉoj! Sed kial do Ĵak ne fajfas?

Kaj li ree aŭskultis, kvankam ĉiuminute tio fariĝis pli kaj pli malfacila: la vagonaro estis jam tiom proksima, ke ni vidis ĝiajn flavajn rabobestajn okulojn, kiuj vagis en malhelo.


— Estu preta! — seke ordonis Nordano, kaj la soldato kaptis eksplodigilon.

— Unu...

8. La ponto eksplodis

Mi ĉesis ion aŭdi krom vagonara bruo. Ĝi ŝajnis ond-albato aŭ tondro de cent dinamomasinoj. Tri

¹⁾ ferfandaj uzinoj.



okuloj trapikis la miajn; mi blindiĝis kaj eksentis min tute malforta. Tamen la rapida nerva voĉordono de Nordano min rekonsciigis. Li kriis:

— Eksplo digu, faru eksplodon! Nu do! Ni tutegale pereis. Vi rigardu: oni saltas de l' vagonaro kun lanternoj. Ili kuras al la rivero. Oni perfidis nin! Sed kial do ĝi ne eksplodas?

Du tondrobatojn mi ekaŭdis unu post la alia kaj eksentis akran doloron en la kapo. La ŝteloj tutamase falis de l' ĉielo sur min. Mi ankaŭ falis kaj rekonsciigis nur en regiona malliberejo.

9. *Ree la paradoksa cikatro*

Mia kranio iom krevis, sed oni kuracis ĝin malgraŭ tio, ke mi kune kun aliaj ricevis mortpunan verdikton. Mi ne ĉeestis la juĝon kaj ne sciis la detalojn. Neniu el ni apelis kaj Nordano kun Ĵak estis pendigitaj; la soldato mortpafita. Mian ekzekuton oni prokrastis ĝis resaniĝo. Sed tiu "kata" kompatemo min helpis; mi forkuris el malsanulejo, vestinte uniformon de l' flegisto, kiu provizore min anstataŭis en la lito kaj estis ekzilita Siberion. Mi elmigris eksterlandon kaj revenis nur post la revolucio. Longe mi ne povis ekscii la detalojn kaj sekvojn de nia afero. Nur antaŭ unu — du jaroj mi trovis en historimuzeo la solvon.

Ĝis tralego de ĉi dokumentoj mi eĉ minuton ne dubis pri perfida rolo de Kras. Tamen du faktojn mi ne povis kompreni; unue — kiamaniere Nordano povis erari pri karakterizo de Kras kaj malatenti

lian sintenadon. Due kial Jak ne fajfavertis nin, ĉar mi estis vundita de l' homoj kiuj venis de nia malfronto, t. e. *ne* de l' vagonaro.

10. *Kiu do pereigis?*

Estis tre simple: Kras nin *ne* denunciis, sed poste, kiam li estis arestita, perfidis. Li fariĝis ĝendarma dungito kaj indikis multajn kaŝlokojn.

Nin pereigis la soldatoj, kiujn ni tute malatentis. La vino estis ne tro forta. Ili liberiĝis kaj ekvidis nin. Siajn fuzilojn ili ne trovis kaj ekkuris al la stacio. Laŭvoje ili renkontis Jak'on, lin ŝnurligis, poste komunikis al la stacia ĝendarmo, avertis la vagonaran estron, kaj oni nin ĉirkaŭis.

La vagonaro ne eksplodis, nur la ponto; tamen la signalo estas donita, la striko okazis. Certe, oni ĝin sangodronigis, sed la jaron sekvantan per giganta balailo — la carismo estis forbalaita. Ankoraŭ eksplodo kaj ekfajris protuberancoj de Oktobra Revolucio.

III. ĈEFO DE FERVOJA GARDISTARO

1. *Ŝtel-regiono*

Post la revolucio mi estis sendita al nord-orienta regiono apud Ural-montaro. Tie mi vizitis etan vilaĝon ĉe fervoja stacio, kie oficis mia frato, inspektisto de komerca fako.

Jen pri la frato (ordinara historio): ĝis 1905 li estis aktiva revoluciulo, kelkfoje arestita kaj eĉ

ekzilita Siberion. Venko de reakcio kaj malvenko de revolucio en 1905 lin tute aliigis. Li fariĝis senforta, skeptika, nedecidema, Likvidisto. Kaj poste: simpla filistro.

Dum mia vizito li mokis sendente nian ekonomian politikon, penante pruvi per ciferoj ĝian fiaskon. La malnova kanto! Mi provis kontraŭbatali, sed lia galoriĉa fanatikismo dronigis ĉiujn objektivajn pensojn. Mi ridetis, ridetis kaj finfine komencis lin insulti: ja tedis al mi tiu malnoveca grumblo.

Por surbazigi siajn konkludojn la frato montris amason da telegramoj pri senĉesaj ŝteloj en ŝarĝvagonaroj dum 1922 j.

— Jen via pliboniĝo de l' transporto!

— Ĝis kiam niaj fervojaj inspektistoj nur kviete observaĉos ŝtelojn — respondis mi: — la pliboniĝo tiuloke ne tro sukcesos, eĉ male: la pliboniĝo aliloka estos nuligita iom post iom. Sed ne forgesu, ke tiuj oficistoj ne longe restos kvietaj observantoj. Estu trankvila pri tio. Ja ekzistas multe da bonaj rimedoj por...

La frato ofendiĝis kaj eksilentis.

Kvankam mi ne vidis lin dum 5 jaroj, tamen plu mi ne povis paroli kun li. Mi adiaŭ-diris kaj foriris al strato.

Malrapide paŝante al la stacidomo mi renkontis du knabinojn, kiuj trotis kun libroj kaj lignopecoj en la manoj.

Kial libroj kune kun ligno?

Mi demandis. Ili ekridis kaj respondis fiore.

— La lignon ni portas en lernejon. Ĉiutage po unu peco. La patroj alveturigis ĝin el arbaro hejmen kaj nun ili donas, kiel lignoracionon por hejti en klasoj. Jes, lignoraciono!

Ili ridis kaj mi ridis. Tamen la raciono estas ne tre saĝa: ja vintro estas frostiga! La infanoj povas glaciigi siajn nudajn fingrojn. Necesas tion ŝanĝi. Kaj mi glitkuris kun la knabinoj en ilian lernejon.

Tie min renkontis instruisto. Ni interparolis. Li longe plendis kamparan vivon, la idiotecan, krudan, monotonan. Samvilaĝanoj malbone lin traktas. Neniu komprenas, neniu helpas. Ĉiuj postulas, ĉiuj kontrolas, mokas, insultas, minacas. Tute mankas ripoztempo. Ĉiuminute oni tedas: skribu leteron, tralegu gazeton, verku petskribon, diru — ĉu ekzistas dio kaj geheno? Ĉu li estas enciklopedia vortaro? La instruisto preskaŭ ĝemploris:

— Mi ne alkitimiĝis al tia vivo. Mia patro estis bienposedanto. Mi vivis eksterlande kaj studis teologion en Berlina Universitato. Mi estas doktoro de teologio kaj... devas instrui en tiu-ĉi barbara lando! Sensencaĵo! Plu mi ne povas toleri. Mi vendos mian oran krucon kaj arĝentajn kulerojn. Mi forveturos en centron: eble mi sukcesos elmigri el Sovetio. Ja troveblas lando, kie doktoroj de teologio valoras pli ol 30 rublojn ĉiumonate.

— Certe! Forveturu! Sovetio ne bezonas teologian putraĵon.

— Kio?

2. Nova instruisto

Post du tagoj en loka soveto estis ricevita telegramo.

“K-do Lod ricevas postenon de instruisto en via vilaĝo anstataŭ civ. Purt. Ekhavu plej fortan kontakton kun li.

Gvidanto de Gub. Klerig-fako.”

Kaj efektive mi ekhavis tre fortan kontakton kun vilaĝanoj. Eĉ tre facile. Ili ne estis tiom trudemaj, kiel priskribis mia antaŭulo civ. Purt, doktoro de teologio. Nur estis necese bone trakti ilin. Baldaŭ mi akiris ilian konfidon kaj simpatian. Certe mi laboris multe, sed ĉu mi venis ĉi-tien por ripozi? Kamparo ja ne estas ripozhejmo.

Jen mia ordinara labortago:

- 8—12 lernejo,
- 12— 2 infan-rondetoj aŭ helpo al jun-pioniroj,
- 3— 5 librotendo en kooperativo vilaĝa,
- 5— 7 instruado al analfabetuloj,
- 7— 9 buŝ-legado de gazetoj, prelegoj, gvidado en biblioteko,
- 9—11 kontraŭ-religia propagando, partopreno en spektakloj, kino,
- 11—12 prepariĝo por sekvanta labortago.

Krom tio mi kunlaboris en gazetoj kaj instruistaj revuoj. Mi plenumadis partiajn taskojn ktp.

Sed min tiu laboro ne kontentigis plene: ĝis kiam okazis vagon-ŝteloj en tiuj-ĉi lokoj, mi ne povis esti trankvila.

Neniu moskva vagonaro trapasis nian stacion sen akcidento. Kaj neniam juĝ-esploroj helpis. Rabistoj ne troveblis. Fine mi venis al mia frato kaj eks-citite demandis:

— Kion do vi faras ĉi-tie?

— Mi laboras 24 h. ĉiutage — respondis li —: sed neniun friponon mi kaptis, ĉar ĉiuj friponas.

— Ĉu vin helpas fervoja gardistaro?

— Ili? Ili mem estas ĉefoj de ŝtelistoj.

— Kial vi silentas?

— Ĉekomence pruvu kaj poste parolu! Antaŭ kelkaj tagoj mi pensis, ke ili jam estas kaptitaj, sed mi eraris. Ili forglitis. Jen kio okazis. Estis repesata vagono kun eksterlanda sapo por hospitaloj en malsat-regionoj. Oni trovis, ke ĝia plumbaĵo ĉe riglilo estas ŝtelita. La pes-kontrolon gvidis nova mezuristo, kiu antaŭ du tagoj alveturis ĉi-tien. La homo sufiĉe honesta. Mi avertis lin pri nia ŝtelaero. Li ridis. Sed finfine tiu aero lin sufokis. La kontrolon ankaŭ ĉeestis ĉefo de gardistaro. Nia mezuristo iris por kelkaj minutoj en necesejon. Kiam li revenis, li vidas: sapokvanto malpliigis. Li tuj alarmis kaj sin turnis al la ĉefo. Tiu konfuziĝis. Ja liaj poŝoj aspektis, kiel et-sakoj. Oni serĉesploris la kontrol-budon kaj trovis ĉie sapopecojn, eĉ en forno kaj sur tegmento. Tiam la mezuristo plendis al estraro. Oni reesploris la aferon kaj la mezuristo estis arestita. Lia kulpo? Provoko. Oni “konstatis”, ke li provokis ŝtelon por makuli la hon-

estajn gardistojn. Kaj li estis ekzilita al Blanka Maro.

Konsternite mi foriris, ne sciante: kion fari, kia maniere lukti? Evidente la ŝtelmalsano progresis en granda skalo.

Estis necese esplori la aferon ĝis la radiko. Sed kiel?

3. Ĉu vi estas partiano?

En bibliotekon venis virino. Ŝi transdonis skribaĵon:

“Lod!

Laŭpove helpu tiun-ĉi virinon, edzinon de l'arestita mezuristo. Ŝi deziras plendi kaj klopodi pri liberigo de l'edzo. Ŝajnas, vi havas konatojn en Moskvo, kiuj povas re-esplori lian aferon. Via frato Taras.”

Mi levis la kapon kaj ekrigardis ŝin. Dudekjara brunulino kun larĝaj femuroj kaj kokso, belstatura, altkreska. Ŝia vizaĝo aspektis, kiel plenluno. Densaj okulharoj borderis la malhelajn okulojn, kiuj brilis kuraĝe kaj vigle.

— Komuniku detalojn de l'afero. Eble mi helpos revenigi vian edzon.

Ŝi atente okulfiksis min, sin klinis antaŭen kaj silentis.

— Bonvolu, mi petas! Rakontu!

Ŝi diris akre:

— Ĉu vere vi estas partiano?

— Ĉu vi ne scias? Sed mi ne komprenas: kial tio vin interesas?

— Se vi ne estas partiano, mi vin ne miksos en tiun aferon, ĉar tiuokaze vi pereos, kiel mia edzo. Mi ekridetis.

— Hontu, kamaradino. Neniam ripetu tiaspecajn malsaĝajn fabelojn. Vi ne forgesu, kie vi loĝas. Ja partianoj ne estas kasto, kiu ĝuas privilegiojn. Ĉiam vi rajtas plendi al soveto, al juĝisto, al ĉefo...

Mi ne finis la frazon.

Ŝi ektremis, ruĝiĝis kaj rapide ekparolis:

— Al la ĉefo? al tiu kanajlo plendi? Mi vizitis lin. Li postulis, ke mi venu ankoraŭ vespere, ĉar li estis okupita. Mi venis kun najbarino. Sed li ankaŭ estis okupita. Li diris, ke mi venu la sekvantan vesperon. Kiam mi venis sola, li kaptis miajn manojn, premis ilin kaj proponis helpi la edzon, se mi pasigos la nokton kun li, kun tiu salivbarba kadavraĉo. Mi ektimis, nenion respondis kaj deziris forkuri. Sed li minacis per revolvero, ree promesis helpi la edzon, nepre lin savi. Mi cedis. Kaj li helpis nenion.

Mi verkis plend-leteron al gubernia prokuroro kaj akompanis ŝin hejmen.

4. Misteroj de l' nokto

Mia cerbo zumis, kiel dinamo-maŝino. Mi serĉis ĝustan vojon por venki kaj ekstermi tiun rabistan neston. Krom la plend-letero mi decidis sendi artikolon en urban gazeton. Tiel meditante, mi ne

rimarkis, ke la vilaĝo restis for de mi. Estis senstela nokta silento. Iom neĝis. Bone, mi promenu! Kaj mi direktis min laŭ konata vojeto: dekstre — la relvojo, maldekstre — la kamparo.

Rapide mi iris verŝajne unu kilometron. Kiam mi retrorigardis, ĉie pendis nur grizeblua vualo. Tute mankis fenestrolumoj. Aperis penso pri lupoj, kiuj antaŭ nelonge atakis kamparanon kaj formanĝis lin. Mia mano instinkte serĉ-palpis la poŝon. La braŭningo restis hejme. Estis necese reveni. Sed malproksima obtuza bojo min haltigis. Ĝin sekvis homvoĉoj, ĉevalbleko, glitknaro.

— Bone! — ekflustris mi — la glitveturilo baldaŭ alproksimiĝos kaj mi revenos en ĝi hejmen.

Pasis kvin minutoj. Mi atendis. Pasis 10, sed la bruo ne proksimiĝis. Ĉu oni haltis?

Mi faris kelkajn paŝojn antaŭen kaj ekaŭdis viran voĉon. Ĝi sonis seke kaj malagrabla.

Miaj okuloj palpefiksitis malproksimon, kie aperis tri oraj makuloj. Eble oni perdis la vojon kaj nun ekbruligis lignofaskon?

Mi eraris. Iris ŝarĝvagonaro. Ĝi siblis kaj tondris. Bruis klakante bufroj. El lokomotiva tubo leviĝis ora vosto, kiu superŝutis mallumon per brilaj steletoj.

La vagonaro malrapide iris: ja estis voj-plialtiĝo.

Ĝis genuoj dronante en neĝo mi rampis al relvojo por salti en la vagonaron. Tutegale mi ne ĝisatendos la glitveturilon.

La lokomotivo alproksimiĝis. En kuranta lumstrio de ĝiaj lanternoj mi ekvidis du figurojn apud la reloj. Por unu minuto ili aperis kaj tuj foriĝis en densa nigro. Kaj samtempe stranga bruo ĝisflugis min: kvazaŭ rigliloj de vagon-pordoj ekknaris kaj io peza falis al neĝo.

Jen kion ili atendis! Mi saltis sur ŝtuparon de unua vagono. La lokomotivo iris ankoraŭ pli malrapide. Kaj laŭlonge de l' relvojo glitknaris la glitveturilo, en kiun estis metataj iaj objektoj. Oni ĵetadis ilin el vagonoj.

Malagrabla vira voĉo seke, raŭke ordonis:

— Sufiĉas! Lasu.

La glitknaro ĉesis. Plirapidigis sian ritmon radaro. Intervagonaj ĉenoj grincis. La lokomotivo ekfajfis: baldaŭ la stacio.

Kolere mi grincigis la dentojn kaj palpis la malplenan dekstran poŝon: eble mi trovos la braŭningon? Sed ĝi restis hejme, certe restis.

5. Renkonto

Tiu nokto estis decidiga. Matene mi venis en la stacidomon por sendi artikolon al gazeto. En malhela koridoro mi renkontis la fraton, kiu iris kun altkreska nekonata persono, ŝajnas: flavharulo. Min salutis la frato kaj haltigis. La nekonato ankaŭ haltis.

— Ĉu vi ne konas nian ĉefon de gardistaro — mirigite demandis la frato.

Mi nee balancis la kapon.

— Estu konatoj — diris li kaj alproksimigis la flavharulon.

Tiu etendis la manon kaj ekmurmuris per malagraba, seka voĉo:

— Delonge mi deziris konatiĝi kun vi, sed mankis tempo vor viziti vin en la lernejo. Kaj en klubon mi ne venas.

Mi nenion respondis kaj foriris, ne sendinte la artikolon.

Certe mi rekonis tiun sekan kaj malagrablan voĉon de l' nokta ŝtelisto.

6. *Alia renkonto*

Post duonhoro mi estis foriranta Moskvon en rapida vagonaro.

Pasis semajno, kaj speciala milit-vagonaro haltis apud nia stacidomo. La alveturinta taĉmento de milit-kursanoj kaj moskvaj fervojaj gardistoj komencis serĉesploron. Kelkcent oficistoj estis arestitaj, inter ili — certe la “ĉefo”, en kies loĝejo oni trovis veran universalan magazenenon.

La serĉesploro rezultigis, ke multaj oficistoj ne nur estis ŝtelistoj, sed iamaj caraj kaj blankaj oficiroj, altranguloj, ekzekutistoj, kiuj lerte kaŝis sian pasinton.

Kiam vagonaro de arestitoj estis forveturonta, mi eniris okaze kupeon, kie estis gardata la “ĉefo”. Li sidis sur benko kaj trankvile damludis kun arestito.

Mi staris apude kaj rigardis lian klinitan flavharan kapon. En tiu pozo li similis katon, kiu jen — jen saltos sur muson. Liaj lipoj avide tremetis kaj ridetis.

Ie mi vidis tiun rideton, sed kie?

— Ankoraŭ 3 movoj kaj vi estos — balbutis la “ĉefo”, movante damon — vi estos venk . . .

Li ne ĝuis la venkon. Ludfino ne okazis.

Mia pugno glitbatis lian kranion. Flavruĝa hararo forglitis kaj falis. Li portis perukon.

— Jen kie mi renkontis vin, — laŭte ekkriis mi — sinjoro ĝendarmo en Lo?

Dum unu sekundo lia vizaĝo tute ŝanĝiĝis. Malhele skarlataj makuloj aperis sur liaj vangoj. Li leviĝis. Tio daŭris nur unu sekundon. En la alia mi eksentis akran doloron en la gorgo. Li sufokos min! — ekflugis la penso. Sed mi ne povis krei.

Min rekonsciigis pafkrako kaj obtuza bruo de falanta korpo.

Miaj fingroj nerveme premis mantenilon de l'braŭningo. Ĉu mi pafis? Kaj senkonscie mi ree premis la malstreĉilon. La ĝendarmo senmovis.

La dua pafo estis nenecesa laŭ leĝo, ĉar atakanto forlasis sian intencon. Oni min riproĉis en loka partia kontrol-komisiono. La riproĉo estis oficiala. Mi plendis al Centra Kontrol-Komisiono. Ĝi min invitis Moskvon. Post tri tagoj mi jam estis tie.

IV. EN^o C. K. K.

1. *Lod atendas*

Kiel petolema infano, kiu atendas riproĉojn de patro — mi eniris kunven-salonon de C. K. K. Mi venis frue. Oni ankoraŭ ne kunsidis. Mi ne devis rapidi, ĉar mia afero estos aŭskultata laŭvice post du ankoraŭ.

Mi sidiĝis en fundo de l' salono kaj iom dormetis: ja en vagonaro mi tute nedormis pro senfina bablado.

Kvazaŭ en sonĝo mi ĉeestis dum malfermo de l' kunsido.

Venis k-do Zelc, surmetis nigran nazumon kaj bonkore rigardis la juĝoton.

— Sidiĝu, kamarado!

Mi ekridetis: kiaj afablaj ili estas. Nur mankas glaso da teo por plena familia idilio.

La juĝata kamarado sidiĝis. Li estis mezaĝulo, mezkreska, kun indiferenta vizaĝo. Li tre nervemis.

— La afero de k-do Sarkov, inteligentulo, partiano de 1905 — raportis lignavoĉe juĝesploristo.

La vizaĝo de k-do Zelc fariĝis pli kaj pli afabla, kaj samtempe iom mirigita rigardo sin direktis al la raportanto, kvazaŭ ĝi malpacience, senparole demandis:

— Kio okazis? Kio do povis okazi?

— Estas ricevita komuniko — daŭrigis trankvile la esploristo, malrapide purigante sian nazon per

neĝo-blanka naztuko —, ke k-do Sarkov oficis de l' jaro 1916 ĝis 1917 en defenzivo. Kamarado, kiu komunikis . . .

— Sufiĉas — interrompis lin Zelc kvazaŭ abelpikita — ĉu vi oficis en defenzivo?

Minuta silento. Ĉiuj streĉite rigardas al Sarkov. Nenio restis de l' bonkora esprimo sur vizaĝo de Zelc, kiam li estis dirinta: “sidiĝu, kamarado!”

— Ĉu vi oficis en defenzivo?

La voĉo balbutanta:

— Lasu min diri... Jen kio... kiam...

— Por kio vi diras tion. Respondu simple: jes aŭ ne?

— Mi... mi... por profito de l' partio. Mi nur salajron ricevadis. Tuj mi klarigos. Jen kio, kamaradoj...

“Kamaradoj“?! Ĉu ni estas viaj kamaradoj?! — indignis k-do Zelc. Ti-kiuj ricevadis salajron en defenzivo neniam estas niaj kamaradoj. “Por profito de l' partio“?! Ĉu nia partio komisiis al vi tiun aferon? Ĉu oni vin devigis ofici en defenzivo? Kia ridindaĵo: “li nur salajron ricevadis“? Eble defenzivo estis filantropia asocio?

— Vi ne kredas. Sed la plej bona pruvo estas tio, ke mi neniun perfidis... Neniun... Kaj eĉ interpartia komisiono en 1917 lasis min libera — pafkrias sian ĉefan argumenton Sarkov.

— Se tio estas vera, tio donas al vi rajton ne esti mortpafita. Sed tio tute ne rajtigas vin esti

partiano. Tre interesa afero! salajron li ricevadis, neniun perfidis kaj sekve — li povas, li rajtas esti partiano! — venendiris Zelc.

— Ĉion li mensogas! — Subite eksaltas, kiel dek kvinjara junulo k-do Aŝ, kiu komunikis pri Sarkov. Mi mem estis en tiu komisiono. Li plorblekis, ĝemkriis, histeriis kaj finfine ricevis viv-verdikton nur dank' al siaj orfiĝontaj infanoj, kiujn, interalie, li tute ne havas. Kiam mi alveturis en 1917 Donec-regionon, mi trovis lian loĝejon, arestis lin kaj poste savis lin de popolamasa juĝo: oni nepre deziris lin dronigi. Laboristaro akompanis lin per kata simfonio, per kaserola orkestro. Kaj nun li estas direktoro de Donec-regiona Trusto. Partiano de 1905.

— Ĉu vi estas direktoro de l'Trusto? Partiano de 1905?! Kiel vi aroĝis? — indignite krias Zelc. 10 jarojn, ne malpli vi devus esti sur batalfronto, per sango vi devus meriti la malkulpigon.

Sarkov estis konsternita.

— Sed mi perfidis neniun!

2. Delegito

Plu mi ne povis toleri. La dormemo plene foriĝis. Mi leviĝis kun bruo kaj, puŝante najbarojn, salt-paŝis antaŭen al tablo de k-do Zelc. Mia voĉo eĥe ektondris:

— Kras, ĉu vi forgesis min? Ĉu vi forgesis tiujn, kiuj iris eksplodigi la ponton en Lo? Ĉu vi rememoras Nordanon? Jakon? Ili ja estis pendigitaj!

Ĉu vi rememoras nekonatan soldaton de revolucio, kiu sen plendo iris al morto kaj estis mortpafita? Ĉu mi ne scias, ke vi nin perfidis post via aresto kaj indikis multajn kaŝ-lokojn? Mi, kiel delegito de viaj viktimoj, kiuj pereis dank'al vi, mi diras al ci, burgêca teler-lekulo, ke ne pasos eĉ 24 horoj de ĉimomento ĝis kiam ci ĉesos trompi homojn. Mi propramane . . .

K-do Zelc min silentigis.

Kras mallevis la kapon kaj nenion respondis.

Tiam leviĝis nekonata laboristo.

— K-doĵ! Mi estas homo ne instruita. Tutan vivon mi fosis en minejo, kiel talpo. Mi ne povas oratori, sed mi diru: neniam, eĉ dum carismo oni vidis en Donec-regiono tian friponecan direktoron. La salajron ni devis ricevadi la 1-an tagon de ĉiu monato, sed neniam tio okazis ĝustatempe. Li spekulis per nia mono. Li ĝuis vivon malĉastan kaj luksan. Li pensis nur pri sia propra haŭto. Kaj ni malsatis. Miaj k-doĵ — ministoj komisiis, ke mi diru al vi, ke tiajn cimojn, kiel nia eksdirektoro, necesas ekstermi, ekstermi kaj ankoraŭ unu fojon — ekstermi. Ili ja estas tre fekundaj. Hodiaŭ — 10, morgaŭ 100. Tion ni ne povas permesi. Pli bone estas neniigi dek burĝojn (erare) ol unu preterlasi (ankaŭ erare)!

— Vi povas foriri, civ. Kras-Sarkov — proklamis k-do Zelc: — forlasu nin!

Rezolucio:

“... forigi el la partio. Transdoni lian aferon al prokuroro.”

Tiam mi ekkriis:

— Kion vi faras, k-doj! Por kio estas bezonata tiu komedio. Ordonu lin mortpafi, tutegale li ricevas mort-verdikton.

Ree min silentigis k-do Zelc.

— Ne furiozu ĉi-tie. Kion li ricevos, ni scias. Pri tio ni eĉ ne parolu! Nia juĝo ne konas kompatparolojn por tiu forĵetindaĵo. Pli bone, diru: kion ni faru al vi? Vi malpaciĝis kun via kontrol-komisiono. Mi jam konas vian aferon kaj opinias vin esti prava. Jen kio: veturu suden. Sufiĉas por vi malvarmo. Oni tie tre bezonas laborantojn en kamparo. Ĉu vi konsentas?

Mi certe konsentis. Sed mi forveturis nur tikiam Kras estis mortpafita.

V. FINPAROLOJ

Lod finis sian rakonton kaj silentis. Bert ankaŭ. Ilin rekonsciigis nur malproksima sonorado.

— Oni vokas tagmanĝi — diris Lod kaj leviĝis de l' sablo. — Kvankvam mi tute ne deziras manĝi, sed necesas iri.

— La severa regularo!

— Jes! Tamen ĝi necesas. Dum lastaj du semajnoj mi akiris 8 kg. da pezo. Kaj tio estas ordinara afero en ripoz-hejmo!

DELEGITARO

1. Markatun

Hodiaŭ li estis tre kolera, terure kolera. Kolera, kiel tigro, hipopotamo aŭ io simila.

Efektive, pripensu: lia plejintima amiko, kun kiu li ĉiam drinkis, ne ŝparante patran monon, en ĉiuj plejluksaj restoracioj de iama Blanka Moskvo ~ Saĉjo Vost, generalo de Blank-armeo kaj mastro de aĉa drinkejo "Dukapa aglo" — rifuzis tason da kafo al li, al riĉa bienposedanto Markatun. Teruro!

Certe li ne povis *hodiaŭ* pagi, sed ĉu *morgaŭ*, kiam krevos soveta sap-veziko kaj la kamparanoj lin renkontos per salut-sonorado de preĝejaj sonoriloj, ĉu morgaŭ li ne rekompencos tiun bagatelaĵon? Kiu dubas?

Kaj kia maldankemo! Saĉjo Vost?! Kiu povis antaŭvidi? Evidente la homaro aliigis aŭ almenaŭ plenputris.

Sed necesas ion aranĝi. La stomako malplenas. Hieraŭ li sendis anoncon en gazet-kontoron. Hodiaŭ oni ĝin presis. Sed ĉu oni povas esperi multon de jena anonco:

"Atentu! Propraj rememoroj pri cara familio kaj plej famaj korteganoj estas vendataj. Ankaŭ — pri teruraĵoj de bolŝevikoj. Prezoj moderaj! Rapidu! Por opa aĉetado — rabato 50 %.

En la sama loko ankaŭ oni vendas malnovajn galoŝojn kaj drapajn pantalonojn."

Jes, li ne esperis. Tre ofte samtemaj anoncoj tudas leganton. Eble iu venos aĉeti galoŝojn? aŭ pantalonojn? Ja la prezo estas tre modera.

Kaj Markatun malgaje manfrotis post la orelon laŭ malnova rusa kutimo, sed tio ne helpis: savpenso ne venis. Venis nur apetito pligrandiĝanta.

Subite oni frapis la pordon. Li malrapide leviĝis de lito kaj ekmiris. Nekonata vizaĝo. Gentilhomo. Dikvanga. Nigrevestita. Kaj parolas li samlingve.

— Nobel-filo, naftoposedinto. Mi tralegis vian anoncon, priparolis kun kelkaj viaj konatuloj kaj decidis vin viziti...

— Jes, jes. Mi havas tre valorajn kaj interesajn rememorojn pri...

— Ne! Tion mi ne celas.

— Ha, eble vi deziras aĉeti... (Ĉu li bezonas malnovajn, eĉ ne carajn galoŝojn? Stranga homo!)

— Nenion mi aĉetos. La afero jenas. Sinjoro ministro Fuŝ ekhavis deziron akcepti delegitaron el mizera Georgio. Li tre interesiĝas pri bolŝevikaj kruelaĵoj kaj pri terure malbona stato de georgia popolo. Oni vin rekomendis, kiel lertan kaj saĝan organizanton. Mi estas komisiita proponi al vi por diversaj elspezoj 1000 fr. kaj se vi konsentas...

— Sed ĉu mi povas por 1000 fr. veturi Georgion kaj trovi tie necesajn reprezentantojn?

— Certe ne. Sed tion neniu postulas. L' aŭdienco okazos morgaŭ je la dekdua. Se vi konsentas, mi povas transdoni al vi antaŭpagon.

— Jes, mi konsentas. Donu.

Kaj Nobel-filo foriris.

Markatun tenis en mano 100 fr. kaj meditis: kie trovi georgianojn? Sed ĉu bezonataj estas veraj georgianoj? Oni povas fariĝi montano, se oni pagas.

Kaj li decidis iri en kazinon "Et-Ĉevaloj", kie hieraŭ li malgajnis reston de sia monprovizo. Certe li trovos tie necesajn kunlaborontojn.

2. *La ludo estas farita*

Efektive li trovis. Nur estis necese iom atendi ĝis kiam ili plenmalgajnos.

Longe li ne atendis. Pasis kelkaj ĉeval-kuroj sur granda disko. Kelkfoje raŭkis kvazaŭ el gramofona faŭko basvoĉo de severaspekta ludgvidanto; la voĉo grava ne malpli ol tiu de ĉefepiskopo en Cantorbery (Kenterberi) proklamis:

— La ludo estas farita. Plu ne metu monon!

La ĉevaletoj ekgalopis. Venis la kvina al finloko. La solena voĉo ektondris:

— La kvina, malparnombro, unua duono. Eblas meti!

Kaj responde al liaj paroloj — fraŭlinoj, kiuj sidis ĉe tabloj, ripetante komencis pepi, bleki, graki, kvaki:

— Eblas meti, eblas meti.

Kaj en tiu sama momento okazis interkonsento inter kvar homoj. La georgia delegitaro estis finkonstruita. La neforgesebla tago, kiun oni enskribos

sur la paĝojn de mond-historio! La mizera popolo estos aŭskultita! La granda ŝtato ekinteresiĝis pri ĝia malfeliĉa sorto. Kaj io okazos! Okazos nepre.

Kvar ĵusbakitaj georgianoj sentis la gravecon de l' momento, kaj pro tio la voĉo de Markatun konvene tremis, kiam li eldiris, kvazaŭ akceptante ĵurpromeson:

— La ludo estas farita. Eblas meti.

— Jes, — ĥore respondis tri delegitoj: eblas meti, eblas meti.

3. *Georgianoj*

Por konfirmi la historian traktaton kaj preparoli detalojn ili venis kvarope en faman drinkejon "Dukapa aglo", kiun oni misnomis "Senkapa aglo", ĉar sur la elpendaĵo ĝi efektive tiel aspektis.

Estis bongustaj manĝaĵoj kaj vera rusa brando. Ne vane Saĉjo Vost estis plejbrila generalo de Blankarmeo. Li konis kaj ŝatis ekzotikajn menuojn kaj povis plenumi ĉies gastronomiajn postulojn.

Unu el la delegitoj, Hundbojov, gravmiena homo kun karotkolora barbo estis "pez-industriisto", t. e. li havis pezan laboron. Li gvidis fakon "Novaj ideoj en tekniko" de ĉiutaga ruslingva ĵurnalo "Popol-filo". Jes, tre peza afero, ĉar neniam en la patrolando li tion gvidis. Pli ĝuste li eĉ ne vidis teknikajn librojn. Sed lia patro havis fanduzinojn en Ural-regiono kaj pro tio oni lin opiniis specialisto en tiu demando.

Bedaŭrinde tiu specialeco ne multon liveris al li. La teknika fako funkciis nur 2 fojojn dum monato. Sekve Hundbojov havis sufiĉe da libera malsat-tempo por industrieri per ajnaj aferoj.

La dua georgiano, Favkin, sin okupis pri leter-skribado, kvankam nek skribisto, nek verkisto li estis. Li ĉiutage sendadis leterojn (certe sen poŝtmarkoj) al diversaj historiaj personoj. Li skribis al konata doktoro (eble pli konata buĉisto) Cankov, gratulante lin pri sukcesa vivsekcio, kiu savas Eŭropon de "ruĝa malsano" (kaj interalie petante helpi sian kolegon, Favkin iaman profesoron de carisma universitato), kaj al Ĉemberlen li ankaŭ skribis, proponante siajn servojn, kiel sperta kaj meritita magiisto, pensdivenanto — okupo sufiĉe necesa por diplomatio de nuna nebuleca momento. Li sendis leteron eĉ al Komintern, humile petante "estimatan sinjoron Zinovjev" atenti liajn mirindajn kapablojn, kiujn li montris dum senkompata persekutado de bolŝevikoj, kiam li estis ĉefo de Esplorfako en Blankarmeo. Certe li povas sammaniere batali kontraŭ blankuloj, se oni donos konvenan postenon al li en "komunista defenzivo". Ja li estas neŭtrala, senpartia specialisto. Li garantias al Zinovjev plialtiĝon de labor-produktivo je 100 %, ne malpli. Nur atentu lin!

La tria georgiano estis pli serioza homo ol aliaj. Lia specialeco — liverado de cirkuleroj. Se vi bezonas tiun de Zinovjev, Stalin, Trocki ktp., nur diru: kiun temon vi elektas. La cirkulero kun sub-

skriboj, stampo, sigelo — tuj estos preparita. Kaj neniŭ kuraĝos dubi, ke la subskribo ne aŭtentikas. Ĉio estos en ordo. Eĉ inkmakulo en parafa fino, se necesas. La delegitaron li partoprenis nur pro tio, ke li malgajnis, kaj Elpifidor Brust, estinta deputito de Rusa Parlamento, ja ne povas mizere vegeti:

— Ĉiu ricevu laŭ kapablo. Sekve vi ŝuldas al mi...

Li komencis kalkuli. Aliuj — ankaŭ.

Kvankam iliaj pretendoj kreskis laŭ kvanto de l' brando drinkita, tamen Markatun tion ne timis:

— Por dek frankoj mi vin povas aĉeti kune kun tuta via farĉo!

Sed li eraris.

Responde al lia penso Brust malice demandis:

— Kiam vi pagos al ni? Malpli 500 fr. eĉ ne proponu! Kaj dume pruntedonu 15 fr.

— Prenu 10 fr. kaj la tutan honorarion vi ricevos post l' aŭdienco. Ministro Fuŝ ne trompos. Honesta homo! Mi vidis lian fotoĵon: kiom da ordenoj?!

— Nu, bone: donu 12 fr. kaj ni disiĝu. Ricevinte la monon Brust iris en la kazon kaj aliuj komencis priparoli rolojn.

4. Plu mi ne povas toleri!

Eminenta ministro Fuŝ akceptis la delegitaron tre afable, kvankam nenies manon li premis.

Ĉirkaŭita de korespondantoj kun not-libretoj li sidis apud la tablo kaj tute kontente okulfiksis mizerajn reprezentantojn de l' multsuferanta popolo.

— Via ekscelenco, — sin turnis al li, Nobel-filo, kiu ankaŭ eniris la kabineton: tuj vi ekaŭdos per propraj oreloj, kion alportis bolŝevikoj en mian patrolandon. Mi ne aludas min mem, kies naft-entreprenojn oni rabis, mi atentigas nur vin pri stato de malsuperaj klasoj, kies reprezentantoj ĵus venis el georgia kazemato. Vi ilin aŭskultu!

— Jes, jes. Mi aŭdas, t. e. mi aŭdos, — balbutis maljunule la ministro — Saluton por vi, karaj kaj kuraĝaj gastoj! Saluton!

— Ho, mia afabla animo! Saluton ankaŭ por vi! Estu benata via glora nomo! — respondis Markatun per obtuza krakanta voĉo. — Ĝi brilu, kiel suno sur Nigra Maro, kiel sunradioj sur neĝaj deklivoj de Kazbek, kiel... hm... karbunklo plej-granda, kiel...

Markatun plu ne povis elpensi orientajn salutojn kaj komencis per piedo puŝi siajn kunulojn, ke ili ankaŭ salutu.

Ili komprenis kaj triope senorde ekhurlis en sia nacia lingvo:

— Bastono, bastono, pistolo, selam alekum, faze-
olo!

— Jes, jes. Mi dankas. Kiaj mizeruloj! — daŭrigis la sinjoro ministro, ne ĉesante rigardi iliajn vilharajn kapojn, arĝentornamitajn vestaĵojn kun longaj vere kaŭkazaj ponardoj ĉe zonoj: Iliaj botoj ankaŭ aspektis mizere, ĉar oni ilin zorge polvo-kovris.

— Sed kial do li rigardas tiom atente — pensis Markatun: eble mi luprenis ne ĝustajn kostumojn? Lokaj kostumistoj komprenas kaŭkazan modon ne pli bone ol ŝafoviro.

— Jes, mi vidas — malgaje ekspiris Fuŝ kaj sin turnis al Markatun: eble vi rakontos al ni, estimata sinjoro... hm...

— Princo Karapet Ŝajtanŝvili. ✓

— Jes, kara princo kar... kar...

— ...apet Ŝajtanŝvili — eksufloris al lia orelo Nobel-filo.

— Dankon! Mi nun memoras.

Karapet komencis rakonti:

— Antaŭ viaj mil-kandelaj okuloj staras reprezentantoj de diversaj klasoj en mizera Georgio. Ekzemple, mi estas posteulo de potenca georgia dinastio, kiu regis centjarojn. Kaj nun mi devas almozpeti aŭ labori, kiel simpla laboristo! Mi preferas almozpeti ĉe miaj egaluloj ol iri en malpuran homamason, kiu tiel malbone odoras. Kune kun mi — ĉi-tie ĉeestas 3 montanoj: laboristo, kampano kaj "dĵigito" t. e. rajdisto libera.

— Jes. Mi ĝojas. Saluton por vi, karaj kampano, laboristo kaj dĵ... dĵ... rab... rab...

— Rajdisto, via moŝto — korektis Markatun, ree puŝante la delegitojn.

|| — Saĉrefi, tondrefi, juki, kluki, baŝibuzuki, ĉeko.

— Dankon! Sed kial: "ĉeko"? Mi ne kom...

— Jen tiu, via ekscelenco — rapide lin interrompis Karapet Sajtanŝvili, montrante per fingro al fulgokovrita vizaĝo de Hundbojov: li estas diligenta, pacema kaj tre obeema laboristo en naft-entrepreno. Li ricevadis de bolŝevikoj 5 gr. da pano ĉiutage kaj 2 gr. da oleo. Ĉu li povis vivi? Li certe protestis. Kaj oni lin torturis en “Ĉeka“. Jen kia libereco tie regas! Kaj eĉ en moskeon oni lin ne allasis. Eĉ Dion li ne povis preĝi.

— Alafi rosul, monafi drinkul! — jesis Hundbojov, forte batante sian bruston.

— Kaj tiu...

Favkin humile sin klinis, aspektante, kiel dika demandsigno.

— Tiu estas simpla kaj zorgema kamparano. Kvin ŝafojn li havis kaj favan kort-hundon. Sed oni ĉion forprenis. Lia familio mortis de malsato kaj lian avinon, t. e. filinon, via moŝto, hm... hm... ruĝarmeanoj hm... hm...

— Jes. Mi komprenas. Mi kondolencas la malfeliĉan patron. — Kaj la eminenta ministro Fuŝ etendis sian blankan, parfumitan manon al tremanta Favkin. Tiu premis ĝin, ekrigardis malsaĝe, ekflaris kaj subite kisis.

La momento fariĝis solena, neforgesebla kaj emociplena. Kaj de politika vidpunkto — ankaŭ tre grava!

Korespondantoj brue ekskrapis per siaj kraĵonoj. Fotografistoj klakis per foto-aparatoj. La

ministro mem ŝajnis iom konfuzita. Nur Markatun restis trankvila. Kiel lerta dresisto, li daŭrigis ŝtonvoĉe siajn klarigojn:

— Kaj tiu...

Brust okulfiksis la ministrojn, strange levis la nazon kaj ternis tiom laŭte, ke mem sinjoro Fuŝ ekstremis.

— Tiu libera montano kuraĝa aglo, "dĵigito", rajdisto. Li ĉasas sovaĝajn aprojn en senfinaj montarbaroj kaj bolŝevikojn sur vojo. Li estis dufoje mortpafota, sed li sukcesis sin savi por veni al via moŝto. Li estas tre karakteriza ekzemplero de georgia popolo. Kaj li diras, ke ĉiuj atendas savon nur de via ekscelenco.

— Jen vi aŭdas! — ekklukis vigle Nobel-filo. Kvankam mi vendis preskaŭ tutan mian naft-entreprenon al lokaj kapitalistoj, tamen mi ĝojas, ke via moŝto liberigos mian patrion.

— Certe, certe. Plu ni ne povas toleri. Unuecfronto kontraŭ barbara Sovet-Unio jam estas organizita. Necesas nur aŭskulti la popolvoĉon de iama Rusio kaj poste iri antaŭen! Ĝis revido, karaj sinjoroj. Iom atendu: via stato pliboniĝos! Ĝis revido, sinjoro princo Parked Ŝovelilo kaj sinjoroj...

Markatun nomis siajn samlandanojn:

— Petroselidze, Lididze kaj grafo Samson Vivihurra.

— Jes, ĝis revido... hm, hm... idze, dze kaj grafo Mason hm... hurra!

— Hurra — ekkriis delegitaro, kiel kornikamaso.

5. *La mendo*

Georgia delegitaro kunvenis en drinkejo "Senkapa (ankaŭ: dukapa) Aglo". La ĉef-delegito for-estis. Li iris al Nobel-filo por ricevi novajn instruk-
ciojn kaj promesitan subvencion.

Hodiaŭ la malvarma koro de mastro Vost deg-
elis: li malfermis kreditpaĝon (unuan en la libro)
por gloraj kaj eminentaj reprezentantoj de mizera
popolo.

Kaj la delegitoj senĝene uzis tiun afablecon: ili
manĝis, drinkis, laŭte interparolis kaj montradis al
konatuloj matenajn ĵurnalojn kun iliaj portretoj kaj
kun sensaciaj titoloj de artikoloj:

"Teroro en Sovet-Georgio."

"Georgia delegitaro ĉe ministro Fuŝ."

"Plu ni ne povas toleri!"

"Vendo de naft-entrepreno en Georgio."

"Minaco por civilizita homaro."

"Unuec-fronto kontraŭ Sovet-Unio."

Je la 12 Markatun ankoraŭ ne venis, sed venis
aliaj ĵurnaloj kun aliaj titoloj:

"Kresko de senlaboreco."

"3 000 000 senlaboruloj."

"Alveturo de soveta ambasadoro."

La delegitaro jam ripozis kaj laŭte revis pri estontaj venkoj kaj pri nova Georgio.

— Verŝajne mi estos ministro de industrio. Ne vane mi gvidas teknikan fakon. Mi, sinjoro ministro Petroselidze, ĉu tio ne sonoras fiere?

— Fazano senvosta! se vi fariĝos ministro, mi estos ĉefministro Lididze. Ankaŭ pompe!

— Ŝafoviroj sencerbaj, malsanon por via hepato. Antaŭ ĉio ricevu monon, poste fariĝu ministroj — diris Brust. — Mi ne estas tiel malsaĝa, kiel vi. Hodiaŭ — ministro, morgaŭ — ministro. Tio ne plaĉas al mi. Ekzemple — mi... malfermos kazon sur la plej luksa strato. Kaj mi mem estos ludgvidanto. Kia belvivo!

— La ludo estas farita. Plu ne metu monon. Bonege! Ĉu ne? Kiam oni forigos vin el viaj ministerioj, mi vin dungos, kiel “tablo-papagojn“. Kriaĉu senĉese: eblas meti, eblas meti!

Hundbojov kaj Favkin ofendiĝis. Sed la interbatalon malhelpis alveno de l' ĉefdelegito. Tuj oni lin ĉirkaŭis.

— Kiaj novaĵoj? Kiom oni pagis?

Markatun malrapide kunmetis siajn tri fingrojn kaj kolere montris al ili:

— Jen ricevu!

— Fripono, ŝtelisto. Vi trompis nin, princaĉo Karapet.

— Ĉu mi estas fripono? Ĉu mi ion ricevis? Oni nenion donis. Jen rigardu, kiu kulpas.

Kaj li transdonis al ili ĵus ricevitajn ĵurnal-telegramojn:

Mendo por 150 000 000 dol.

Ĵus alveturis sovetia ambasadoro R. Li diris al nia intervjuisto, ke li havas en sia veŝta poŝo mendon por 150 milionoj. Sovet-Unio deziras aĉeti maŝinojn, manufakturon, traktor-ojn, plugilojn ktp., se tion permesos politikaj kondiĉoj.“

“Malkresko de senlaboreco — neeviteblas.”

— Mi ne komprenas — nedecideme komencis Favkin.

— Stultulo vi estas pli granda ol tuta azenaro en la mondo — raŭke respondis Brust. — Vi nur pripensu, *kiu* en tiuj-ĉi kondiĉoj batalos kontraŭ Sovet-Unio. Senlaboreco ja nun kreskas?

— Sed kion diris al vi Fuŝ? — demandis Hundbojov.

— Foriru al Alaĥo, se li ankoraŭ ne forputris.

— Sed ni plendos...

— Plen—dos? ekridis moke Brust: plendu!

Kia trompafero! — pensis Markatun, frotante post la orelon. Mem ministro Fuŝ estas simpla kanajlo. Kiom da ordenoj li havas! Evidente la homaro aliĝis aŭ plenputris. Sed mi tion ne lasos. Ne. — Kaj frapinte per pugno la marmoran tableton Markatun ĝemkriis.

— Mi plendos! Plendos! Nepre! — Kaj mallaŭte aldonis: — sed al kiu plendi?

NEKROLOGO

Epaminond Kakatu (pseŭdonimo de d-ro I. Ajn), felietonisto de "Vespera Heroldo" (ĉiutaga, laborista, popol-demokratia, liberpensula, kontraŭ-darvinisma, sendependa, industri-komerca kaj neŭtrala ĵurnalo) prenas nigran kraĵonon (marko: Johann Fabers "Rafael N 2"), akriĝas ĝian pinton ĝis plej alta grado de akreco, malŝate ĵetas ĝin, prenas fontplumon "Cigno", iom ĝin malŝraŭbas, ankaŭ ĵetas for kaj ekrigardas sian etan horloĝon "Dux" sur eleganta rimena manringo.

Ĝuste la 12-a. Post duonhoro lia hodiaŭa felietono devos kuŝi sur redakcia tablo.

La telefon-tubeto jam diktis al li necesajn tezojn:

1. Apotek-parfuma firmao "Opel & Ko."
2. Nova opereto en varietea teatro "Kiu mian..."
3. Sensacia sciigo pri ruĝa teroro en Sovet-Unio aŭ io simila, ekz. bolŝevista komploto en Ĉinio (li ankoraŭ ne decidis, kion elpensi).
4. Tutlanda karbominista striko (pli ĝuste: ties absurdeco).

Kaj al tio li deziras aldoni iom pri si mem, ĉar lia trivoluma sciencverko "Artefaritaj kokidoj" malbone estas disvendata.

Oni rezervis por lia felietono 50 liniojn. Ne sufiĉas. Epaminond Kakatu estas pli babilema ol

ajna kakatuo. Sed... redaktora kraĵono senkompatas superflujajn liniojn. Do... por kia diablo perdi tempon?

Li prenas kraĵonon kaj skribas:

"Feliĉono"

(La titolo jam estas. Pluen!)

Subite eksonoras telefono.

— Allo, mi aŭskultas. D-ro I. Ajn.

Oni telefonas el la redaktejo:

— Jus mortis Sam Perk, gvidanto de Labor-Federacio, membro de... ktp. Vi bone lin konis. Tuj alsendu la nekrologon. Ni atendas ĝis 12.30.

— Nekrologon? Bone. Ĝi estos. Kaj la feliĉono? Ĉu ĝin forĵeti?

Paŭzo. Poste raŭka voĉo de l' redaktoro mem.

— Opel kaj teatro "kisu mian..." dufoje jam petis loko'n en feliĉono. Necesas plenumi. Kaj linio pri la striko ankaŭ urĝas. Jen kio: miksu ĉion kune, ŝanĝu nur titolon. Estu "Nekrologo".

— Bone. Sed...

— Sufiĉas.

Kaj Epaminond Kakatu forstrekas la skribitan titolon kaj surskribas:

Nekrologo

Jus oni komunikis per telefono pri sensenca morto de fama laborista gvidanto, prezidanto de Labor-federacio kaj amiko de Ruzvelt, Taft, Vilson kaj Harding.

Pereis Sam Perk!!!

Li dronis en aĉa marĉo, misnomata Sun-lago en ofte vizitata Luna-parko.

Kiam li trankvile fiŝkaptis, flarante de tempo al tempo mirindan parfumon "Blanka Lilio" el originala bela boteleto (marko: Opel & Ko., Riĉmond), ŝteliris al li morto kun aspekto de forta ŝtormo.

Li dronis, kvankam laŭ onidiro li sukcese povis naĝi en ajna akvo.

La tutmonda laboristaro perdis sian grandan membron kaj mi — neforgeseblan amikon, kies valorajn konsilojn ĉiuj estim-atentis kaj inter ili precipe nia fama d-ro I. Ajn dum verkado de sia trivoluma modeleca sciencverko, kiu traktas pri malkaraj, sed profitriĉaj kokidaj inkubatoroj (aĉetebla en ĉiuj grandaj librejoj).

Bedaŭrinde nur restas 22½ min. ĝis mi forveturos Ĉinion por detale ekscii pri nova bolŝevista komploto, kiun aranĝas moskva buĉisto Karaĥan (interalie: kia terura azia nomo! Ĝi mem skizas la karakteron de tiu persono). kaj pro tio mi ne povas inde karakterizi la eminentan mortinton, priskribi lian vivon kaj verkadon, sed...

Ree sonoras la telefono.

— Allo, mi aŭskultas.

— Ĝus Opel komunikis, ke necesas reklami liajn tute sendanĝerajn prezervativojn. Triobla pago. Atentu!

— Estas.

... sed necesas diri, ke dum lastaj postmilitaj politikaj krizoj lia sintenado estis pli ol saĝa kaj prudenta. Kvankam li apartenis al Socialista Internacio, li komprenis, ke diversaj soc. partioj diversmaniere opinias socialisman kaj kapitalisman mastrumadon. Li prave predikis, ke ŝanĝo de kapitalisma sistemo estas granda kontraŭdia peko, ĉar ĝi elvokas embarason en mastrumado. Sekve plej supera devo de ĉiu idekonscia laboristo estas tutforte subteni ĉiujn penojn por *restarigo kaj kreskigo* de kapitalisma mastrumado.

Kia malebria, dignoplena, profunda pensmaniero!

Kaj tiu mirinda sobereco sin kaŝis en ĉiu lia ago, penso, parolo. Ĝi spontaneis eĉ en lia amsento.

Mi petas bonkoran pardonon ĉe lia estimata vidvino, sed mi devas malkaŝi al legantoj unu lian sekreton (ne timu, la infanec-puraĵ).

Kiam unuan dimanĉon de ĉiu monato kunvenis liaj intimaj amikoj (kaj inter ili certe mi mem), ni iom drinkis...

Epaminond Kakatu subite ĵetas la krajonon kaj rapide kuras al la telefon-aparato, kvankam ĝi ne sonor-vokas.

— 60 — 00 — 6.

— Allo.

— Voku la redaktoron. Urgas. Petas Kakatu.

— Kio okazis?

— Jen kio. Jus mi skribis, ke Sam Perk iom drinkis. Sed mi ne scias, kion li povas drinki en mia nekrologo? Ĉu vinon aŭ bieron? Kaj kiun markon? Ŝajnas, nia ĵurnalo havas aferojn kun bier...

— Stultulo... Vi devas jam scii, ke...

Epaminond Kakatu rememoras, lasas konvuŝii la tubeton kaj kuras al sia seĝo.

. ni iom drinkis bonegan ĉampanvinon de Harison kaj poste sin distris (pardonu ankoraŭ, kara vidvino) en diversaj... gajaj lokoj.

Sam Perk ĉiam uzis malgraŭ niaj malsaĝaj mokoĵ kaj ridetoĵ la plej perfektajn, tute sendanĝerajn prezervativojn de Opel & Ko., Riĉmond.

Kaj tiu sageĉ-traĵto certe influis lian koncepton pri klasbatalo.

Kiom arde li kontraŭstaris ĉiun *perforton* malprudentan kaj tute nudan en taktiko de laboristaro.

Li emis paroli: "bedaŭrinde burĝaro estas devigata uzi perforton, sed ni... proletaro, kiu portas la plej superajn kaj subtilajn idealojn, ĉu ni povas sekvi la mizeran, kompatindan burĝaron? Ne! Milfoje: ne!

Neniam niaj manoj estos makulotaj per fiagoj de perforto.

Plejbona nia armilo estas *moralala indigno*. Ne pli."

Tiel parolis li.

Nur malofte, kiam ribelis diversaj "maldekstrumaj elementoj" kaj minacis nuntempan soci-ordon, nur tiam li parolis aliel.

Kaj liaj paroloj estis venenplenaj. Kaj liaj agoj estis kruelaj. Mi vidis larmojn sur lia viz-aĝo, kiam li salutis niajn kuraĝajn soldatojn, kiuj iris kun aeroplanoj, tankoj, gasoj, kanonoj kaj fusiloj kontraŭ frenezaj ribeluloj, kiuj eĉ revolverojn ne havis en sufiĉa kvanto.

Jes, li ploris kaj benis, kiel mezepoka sanktulo.

Kiel mezepoka nobla kavaliro li defendis sian idealon kaj batalis por *demokratia* principo.

Ĝin li vidis ne nur en formo de ĝentila diskutado en solena parlamenta salono, sed ankaŭ en vizitado de publikaj lokoj.

Burĝo kaj laboristo, kiuj sidas unu apud la alia en lia plej ŝatata varietea teatro "Kisu mian..." kaj aŭkultas pace iun agrablan spritan opereton, ekz. "Darvin sen pantalonoj" (Hodiaŭ ludata. Prezoj moderaj! Sensacia! Ridplena!) — jen vera bildo de homfrateco!

Mia tempoprovizo elĉerpiĝas. Mi devas fini. Sed necesas ankoraŭ noti...

La diabla telefono ree malhelpas.

— Allo!

— Ĝus estas ricevita mendo de Van-der-Bluf-Kompanio. Aldonu pri ĝiaj lit-kovriloj.

- Mankas linioj!
- Tutegale aldonu.
- Eble forlasi la strikon?
- Hodiaŭ vi estas tre malsaĝa! Neeblas.
- Bone.

. necesas ankoraŭ noti,
 (kion noti, diablo prenu?)

ke li malŝatis ĉiam *militon*, tiun abomenan kaj malmoralan monstron.

Li partoprenis pripensadon de planoj en okazo de nova milito.

Generala striko — jen estas inda kaj sankta respondo por milit-proklamo.

Sed neniam li forgesis, ke tiu striko nur estas dezirata *idealo*, tamen ĝi *neeblas* eĉ malgraŭ ĉies deziro, ĉar ĝi povas malutili al kara patrio, kiun li mem kuraĝe defendis kun armilo en manoj, estante help-ministro pri tutarmigo dum la lasta milito.

Kaj ĝenerale li *malaprobis* ajnan strikon, kiel batal-rimedon. Ĝi nur detruas kapitalisman mastrumadon, plimizorigas staton de proletaro kaj sekve plifortigas kapitalisman ekspluatadon.

Malmiopa li estis, maljunulo Sam Perk, kaj tiom bone li gvidis laboristan movadon, ke ĉiuj estis kontentaj: policano, kiu povis ripozi; laboristo, kiu havis panpecon; kapitalisto, kiu ne tremis pri sia entrepreno, kaj eĉ pastro: ja Sam Perk estis tiom tolerema! Eĉ li mem ofte

predikis en diversekleziaj temploj. Liaj ardaĵaj paroloj rezultigis bonan, vere kristanan rikolt-aĵon.

Pro tio mi ne dubas, ke li skuiĝos en ĉerko, eksciinte pri abomeninda striko, kiu ĵus okazis en karb-regionoj.

Tiuj karboministoj ĉiam ŝajnis al li blindaj talpoj. Sed veraj proletoj, kiuj posedas bonan vidsenton, certe ne sekvos ilin.

Ree interrompo.

— Allo!

— Ĉu vi jam verkis sensacion pri Sovet-Unio?

— Ankoraŭ ne.

— Ne forgesu, ke nia gazeto estas kontraŭ Hariman-entrepreno en Sovet-Georgio. Sincler K-o ĵus tion konfirmis al ni. Do nepre verku.

— Estos.

Antaŭ morto lin plej maltrankviligis (kia mola koro!) la mizera prolet-stato en ties nomata *Sovet-Unio*, kiun regas aventurista bando kaj kies celo: senigi laboristaron je ĉiuj homrajtoj, splitigi kaj malfortigi tutmondan laboristan movadon por akceli restarigon kaj plifortigon de kapitalismo.

Sovet-Unio estas vera malamiko de universala *malarmigo*, la plej ĉefa malhelpo por tio, kies sangavida Ruĝarmeo (kolektita el ĉinoj, tataroj kaj baŝkiroj) ĵus sangodronigis (mi timas maltrankviligi niajn molkorajn

legantojn) novan proteston de duonsovaĝa, sed demokratieca popolo en Georgio, kie naiva Harriman-Kompanio deziras starigi sian entreprenon.

Certe tiuj protestoj ne ĉesos, kaj dank' al diboĉoj de rabista Ruĝarmeo tie vane pereos usona mono, kiel tiu de fama, firma kaj forta Sincler-Kompanio. Sed ĉu oni povas kompari kapitalon de Harriman kun tiu de giganto Sincler? Se la lasta plu ne deziras havi rilatojn kun bolŝevistoj, do kion faros Harriman, krom pereigo de akciula mono?

Sam Perk tion ne konsilus al li?

Sed Sam Perk pereis!

Pereis, kiel heroo en malhela akvo de Sunlago, pereis, kiel paca batalanto sur sia posteno, kiel antikva saĝulo.

Li agis prudente ne nur en politiko, sed en hejmvivo ankaŭ.

Li ŝatis parfumon "Blanka Lilio" (Opel & Ko., Riĉmond), senpretendan opereton en varietea teatro "Kisu mian..." (Fox-trott str. n-o 7), ne rifuzis kelkiam bonajn prezervativojn (Opel & Ko.), estis akciulo de fama Sincler Ko. kaj dum libertempo en vilaĝa trankvilo li kreskigis artefaritajn kokidojn laŭ plejtrafa sistemo de nia konata kaj multelegata d-ro I. Ajn.

Li estis modeleca civitano kaj familiano.

Ni sekvu lian ekzemplon.

Dormu en...

T-r-r-r-r-r-r-r-r-r...

— Allo!

— Firmao de litoj “Paco” — ankaŭ petas. Ne prokrastu la feliet... t. e. nekrologon. Oni vin atendas.

— Mi jam finis.

Dormu en “Paco”, kara Sam Perk!

Estu tero por vi — lanuga lit-kovrilo, kiel tiu de la firmao Van-der-Bluf kaj Filoj.

“Vespera Heroldo” hodiaŭ ne havis felietonon, kaj legantoj vane ĝin serĉis en kutima loko: tie nigris nur nekrologo.

Ne malpli vane serĉis Epaminond Kakatu en sia nekrologo nomon de fama d-ro I. Ajn. Ĝi mankis. Ja li pagis *nenion* por enpresigo de l' nomo.

Parolo estas arĝento.



KIM KAJ ROZA

Dediĉita al k-do M. Boubou.

Kim kaj Roza, junaj gepioniroj, en krepusko revenis hejmen el loka vilaĝ-klubo, kie okazis lekcio pri gvidanto de proletaro Lenin.

Lekciisto, malgrasa urbano, rekta, kiel telegrafa fosto, preskaŭ ne fleksante siajn genuojn, longe promenis sur la scenejo (ŝajnas: li paŝmezuris ĝin) kaj malrapide rakontis la vivon kaj gvidparolojn de Vladimir Iliĉ.

Ĉio estis interesa kaj bona, sed Kim kaj Roza deziris manĝi: pro tio ili ekviglis nur ti-kiam la sceneja mezuristo subite aliigis sian voĉon kaj ektondris:

— Lenin mortis, tamen...

— Amen — gaje ekflustris Petro Kurbul, filo de vilaĝa riĉulo — butikisto, senkonscia elemento kaj ne-pioniro.

— Tamen li ĉiam vivas — severe korektis lin Kim, ĉar ne vane li sin nomas “juna leninisto”.

La lekcion sekvis longaj demandoj, poste malrapidaj respondoj, sed finfine ruĝa tola kurteno falis.

La patro deflankiĝis, dirinte:

— Iru hejmen kun la patrino. Mi havas tre urĝan laboron en la komitato.

— Mi vin akompanos — rapide aldonis la patrino kaj ili ambaŭ foriris.

La infanoj solaj venis hejmen.

— Tre urĝa laboro? — murmuris malkontente Kim: mi konas tiun-ĉi laboron — drinki ili iris al Kurbul. Tre simpla laboro! Hodiaŭ oni baptifestenas ĉe li.

— Jes, mi aŭdis: popo 50 rub. por subakvigo ricevis; pli multe ol 500 banistoj kune, se oni ilin vokus — respondis Roza, verŝante akvon en fulgitan tekruĉon.

Kim ekbruligis alumeton kaj baldaŭ kupra “Primus-forno” vigle blufajris kaj zumis.

Ĝis kiam akvo fariĝos bolanta, la geknaboj decidis aranĝi hejmen kunsidon.

La tagordo tuj estis ellaborita. Ĝi enhavis nur solan demandon:

I. La gepatroj

Prezidis Kim.

— La parolon havas k-dino Roza.

Roza leviĝis, supren etendis sian dekstran manon, kiu tenis grandan supan kuleron kaj ekparolis per sonoj dancantaj:

— Kamaradoj kaj kamaradinoj! Bedaŭrinde mi ne povas samelokvente prelegi, kiel Klara Cetkin aŭ nia grupestrino Kanabenino. Sed...

Sia kantanta voĉo ŝanĝiĝis. Nun ĝi sonoris serioze kaj severe.

— ...nia pacienco ĝenerale kaj entute krevis. Okazis tiaspecaj nekontestebraj krimfaktoj, ke plua nia silento ŝajnas vera banditismo. Tamen

malkovri tiujn faktojn ni ne povas, ĉar nia buŝo estas ŝtopita. La gepatroj kontraŭbatalas ĉiun liberecan pens-, sent- kaj agadmanieron.

— Mi protestas. Mensogo. Oni volas min dronigi en supra kulo. — Basvoĉe kriis Kim, grincigis la dentojn, frapis la tablon per pugno, imitante la patron: mi ne permesos ĉikan-makuli mian honestan nomon.

— Jes. Oni klaĉas, klaĉas — rapide pepis Roza kvazaŭ la patrino. Poste ŝi demandis alitone sin mem: — ĉu vi permesis al viaj geknaboj aranĝi liberecan hejman murĵurnalon?

— Por kia diablo ili ĝin bezonas?

— Unue: diablo ne ekzistas. Tion oni delonge jam enprotokoligis en nia grupo. Necesas scii! Kaj due: libereca parolo estas unu el ĉefaj akiraĵoj de Oktobra Revolucio. Kaj murĵurnalo celas alproksimigi ĝin al larĝaj laborist-kampanaj masoj. Nia instruisto ne nur permesis tion al siaj infanoj, sed mem helpas al ili, korektante erarojn. Ankaŭ li partoprenas la ĵurnalon kaj verkas interesajn rakontojn. Kaj vi...

Kim malŝate kuntiras la lipojn:

— Jes. Mi aŭdis. Sensencaĵo. Mi ne povas sekvi ĉiun senpartian stultulon. Al miaj geknaboj tion mi ne per-me-sas, ne permesas kalumnii pri la gepatroj.

Roza plu ne povas toleri trankvilan, kontentan voĉon de l' patro. Ŝi komencas krieti:

— Kiu kalumnias? Vi mem, ĉar vi ne legis hejmn-jurnalon. Ekzemple estas skribite:

“Patrino, necesas prizorgi!

Suĉilo mankas. Manĝo suĉas tukon kun sekala pano. Ne decas.”

Kaj la patrino respondas en fako: *“Resonoj”* —

“Mono forestas. Kiam la patro ricevos la salajron, la defekto estos neniigita.”

Ĉu tio estas malvero? Kaj oni skribas ne nur pri gepatroj:

“Nia pionirino

Ĉu Lenin konsilis al jun-pionirinoj kolorigi siajn vangojn per kemia kraĵono? Tion faras K. Ankaŭ ŝi pinĉas etulojn. Sed sian pupon — ne. Interalie: ĉu povas ludi kun pupo ide-konscia leninistino? Kaj iri en preĝejon por rigardi edziĝo-meson? Ne decas! Ne forgesu pionirleĝojn kaj gvidparolojn de Iliĉ.”

— Kaj tiuj defektoj dank’ al murjurnalo plu ne ekzistas. Kaj vi rifuzas! Vi timas, ke ĉiu artikolo temos pri persekutado de korespondantoj! Sed ni plendos! — Jes, plendos, plen-dos — ripetante kaj imitante grandan homamason obtuze bruas Kim.

— Ni plendos — Roza faris paŭzon kaj emoci-ite finis: al Iliĉ!

— Al Iliĉ. Nepre.

Oni ne fermis la kunsidon. Gvidrezolucio ne estis

proponita. Akvo bolanta vane bruigis kovrilon de l' tekruĉo. Kim kaj Roza verkis leteron al Lenin.

“Skribas al ci, kara Iliĉ, Kim kaj Roza, kiuj estas leninistoj-pioniroj. Ni bone scias, ke vi vivas, kvankam vi mortis. Tion diris hodiaŭ via konatulo, kiu rakontis pri vi en la klubo, sed ni sciis tion jam delonge, ĉar ni legis la plakaton en nia grupejo. Certe ni ne dubas, ke vi ĉion komprenas kaj vidas.

Sed kaŭze, ke ni ne konas, kiu vin povas anstataŭi (ja Rikov multe da laboro havas, subskribante dekretojn por ĵurnaloj), ni nin turnas al vi, ĉar ĝis ĉerko ni estos mortontaj por viaj gvidparoloj al laborista proletario, kamparanaro kaj al ni, junaj leninistoj.

Nia patro ŝtopis nian liberecan voĉon kaj ne permesis al ni eluzi unu el plej ĉefaj akiraĵoj de Oktobra Revolucio — murĵurnalon, ĉar li timas.

Kaj la patro estas komunisto, sed malpli bona ol ni, junaj leninistoj. Hodiaŭ li kuris al riĉulo Kurbul por baptofesteni malgraŭ tio, ke baptado estas burĝa kaj kontraŭ-revolucia superstiĉo, kaj Kurbul (lia filo Petro — ankaŭ) estas malutila elemento por soveta potenco.“

Kim ĉesis skribi, okulfiksis la blujn flamlangojn de “Primus“, kiuj lekis la nigran tekruĉon, kaj klare imagis sian patron, lian altan staturon kaj dikan vizaĝon. Kiam ili loĝis en urbo li estis

malgrasa kaj tute alia. Vespere (se tion ne malhelpis kunsidoj aŭ lekcioj) la patro ŝatis damludi kaj rakonti pri sia vivo dum milito kontraŭ blankuloj, pri Lenin kaj Trocki. Multon interesan li rakontis. Sed nun... nun li sidis ĉe Kurbul, drinkas brandon kaj raŭke kantas nerevoluciajn kantojn. Kurbul kontente blekas, aprobante frapetas lian ventron, kaj insultas sovetan registaron.

— Ĉion skribu, ne preterlasu — admonis Roza. Kim ektemis, ree klinis sian vilharan kapon al papero kaj daŭrigis:

“Jes, nia patro estas partiano, sed unuan tagon de Pasko, kiun ni ne kredas, li aĉetadis kune kun la patrino, kiu senpartias kaj sin pudras (eĉ ni hontas!) kolorigitajn ovojn por pasko.

Kiam venis gastoj, kiuj ankaŭ komunistas, ili drinkis brandon, bieron kaj vinon el urbo. Poste ili kriis: “Vivu kunligo de urbo kaj kamparo!” — tiom laŭte, ke hundoj ekhurlis apud la fenestroj.

Oni festenis kun gramofon-ludado kaj kantoj nerevoluciaj.

Kiam ili plenebriiĝis, kiel...“

— Skribu: kiel porkoj — proponis Roza.

— Ĉu porkoj drinkas?

— Tutegale skribu. Oni tiel diras. Estos komprenebla.

— Ne. Mi skribos: kiel koto. Tio pli malpurigos ilin.

— Mi voĉdonas kontraŭ.

— Sed mi, kiel prezidanto havas 2 voĉojn. Sekve la plimulto decidis por “koto”.

Roza konsentis kaj li skribis:

“Kiam ili plenebriiĝis, kiel koto, ili forprenis niajn ruĝajn kravatojn el vestoŝranko (ni tiam dormis) kaj tranĉis ilin per tranĉiloj.

Poste la tuta bando vagpromenis tra stratojn, kaj la patro perdis sian parti-bileton kaj multajn rublojn de l' komitato.

Kiam lin insultis la patrino, ni aŭskultis; sed la patro ne timis. Li presigis anoncon en ĵurnalo, ke oni ŝtelis de li la monon kaj parti-bileton de aktiva membro de l' partio.

Se vi trarigardos la ĵurnalon, ne kredu: li mensogas. Kaj ni petas: plu ne donu alian partibileton al li. Estu li nekomunista homo.

Por kio mensogaĉi? Ja komunistoj ne rajtas mensogaĉi. Kaj la patro mensogaĉis.

Tial nia kara kaj amata gvidanto Iliĉ ne kredu al li, kvankvam li estas prezidanto de Ekzekutiva Komitato distrikita.

Forigu lin senkompate el la partio.

Li sin pudru kune kun la patrino!

Ni iros en infan-urbeton kaj neniam nin pudros.”

— Neniam! — tremvoĉe jesis Roza kaj aldonis:
— ne forgesu pri “Tarzan“!

— Certe. Sed antaŭ ĉio pri brando, diris Kim,
daŭrigante skribi.

“Kaj en nia grupo ĉiuj estas bonaj kaj ide-
konsciaj geknaboj krom Ivaĉjo Rat, kiu apud
kluba stalo tabakaĉon fumas sekrete, ĉar jun-
pioniroj ne devas fumi. Ni ne fumas, fumon
tra naztruojn ne flugigas kaj deziras esti tiaj,
kiel vi, Iliĉ Vladimir; ni lernas kaj lernigas.

Krom tio ni instruas infanojn de nia naj-
barino: Nikolĉjon, Fedĉjon kaj Ksenjon.

Al ili ni instruas leninismon: kiel kanti
pionirajn kantojn “Gruoj“, “Forĝistoj“ kaj
“Jun - Gvardio“. Ankaŭ ni studas Sovetan
Potencon, Ruĝarmeon kaj: kio estas gvidanto
de proletaro. — Lenin? Baldaŭ ili eniros nian
grupon kaj fariĝos bonaj pioniroj.

Hieraŭ ni pentris per ruĝa farbo vian por-
treton kaj supre surskribis: “Vivu Lenin en
tuta sennacieca skalo“. Nun ĝi pendas sur
muro. Kiam ni pentros alian portreton, pli
belan, ni sendos ĝin al vi.

Kaj poste ni petas ankoraŭ, ke nia granda
gvidanto malpermesu drinki brandon. Pliaguloj
ĝin drinkas tiomgrade, ke ili eĉ niajn kravatojn
tranĉas anstataŭ legi librojn, kiujn ili tute mal-
atentas.

La patro dek librojn havas. Ĉiuj estas dikaj kaj pezaj. Sur la tablo kuŝas ankaŭ viaj noveloj, sed ilin ĝis nun li ne distranĉis. Li kaj la patrino nur legas ian "Tarzan"¹⁾, kiun al ni ili ne donas. Ja ĝi ne estas via verko? Ĝin ili kaŝas en kofron kaj eĉ ŝlosas seruron.

Kaj viajn novelojn muŝoj makulis. Polvo kuŝas sur ili pli granda ol sur la vojo. Unufoje ni prenis ilin por purigi kaj tralegi, sed la patro ne permesis.

Sekve vi ilin forprenu."

— Kaj donacu al ni — petvoĉe proponis Roza.

— Kiam ni fariĝos pli aĝaj — finis Kim.

"Riproĉu la patron kaj ne donu partibiletan al li.

Ni ĉiam kaj ofte skribos al vi.

Ĉiam pretas ni.

Junaj leninistoj Kim kaj Roza.

// P. S. Saluton al k-do Trocki kaj k-dino Krupskaja: ni ŝin bone konas laŭ portreto."

Kim kvaroble faldis la skribitajn paperpecojn kaj metis ilin en ĉifitan koverton, kiun li preparis por letero al eksterlandaj jun-pioniroj.

— Adreson ne forgesu — rememorigis zorgeme Roza.

¹⁾ Serioj de aventuraj romanoj pri homo (Tarzan) kreskinta inter simioj.

— Certe — respondis Kim kaj surskribis rapide la adreson:

“Moskvo sur Ruĝa Placo.
En maŭzoleon de Lenin.”

Poste li pripensis kaj aldonis:

“al Iliĉ Vladimir.”


Ne surmetante la ĉapon Kim elkuris el la domo.

Li kuris ĝis poŝtoŝtanco, palpetrovis en mallumo poŝtkeston kaj ŝovis la dikan koverton tra mallarĝan truon.

Ne trinkante teon, kiu delonge jam malvarmiĝis, ili ĝoje kuŝiĝis kaj baldaŭ ekdormis.

Ili songis la maŭzoleon. En la maŭzoleo sidas Iliĉ kvazaŭ sur la portreto kaj laŭte legas ilian leteron. Apude staras la patro kaj petas pardonon.





Druck :
Uns-Produktivgenossenschaft
Leipzig

Książnica Podlaska

im. Ł. Górnickiego w Białymstoku



KP-F14-0002555